

Tra Fremda Lando.

Ja landon fremdan mi ĵus travojaĝis : neniel kompareblan je la aliaj provincoj de l'*Esperlando*. Apenaŭ tie aŭ tie unu personon mi renkontis parolantan en nia lingvo, kaj per kiom da peno ! Adresaroj kaj jarlibroj donas ja nomojn, sed, aŭ tiuj personoj jam de longe foriris, aŭ nenion ili konas de Esperanto. La vorto eĉ estas nekonata kaj oni devas ĉion klarigi : vere fremda lando.

Tiu ĉi lando estas la Katalunjo, regiono kiu enhavas malgrandan parton de franca tero kaj riĉan pecon el hispana. Lando disŝirita de politikemeco, elturmentita de la batalo de lingvoj, tamen laborema, produktema, agema, fonto senfina de forto. Tra ĝi mi ĵus veturis kelkan tempon, el ĝia centro mi skribas tiujn liniojn, kun certeco ke baldaŭ ĝi estos el la unuaj landoj esperantistaj.

La 4^{an} de Septembro, S^o E. Boirac, ĉiam nelacebla, faris en Céret, urbeto de francaj Pireneoj, paroladon pri Esperanto. Finante, li admonis la ĉeestantojn ne resti malantaŭe en la propagado de nia lingvo, kaj sin unuigi por formi grupon lokan. En la celo vidi ĉu tio estas ebla mi entreprenis la ĵusan vojiradon tra la du Katalunjoj.

Rezultanto estas jena : Grupo Esperantista de Katalunjo estis fondata la 25 lastan, kaj jam montras sian deziron flori kaj produkti.

Provizite per rekomendaj leteroj mi aliris unu Figueras'on kie mi trovis esperantemulojn, favorajn dank'al agemeco de S^o J. Llonch, delegito de franca Touring-Club. Tie ni aranĝis filion de l'grupo, kies delegito loka estas S^o Salvador Dali, notario. Posedante fonografon, li akiris esperantistajn cilindrojn por publikaj elmontroj.

En Barcelono mi esperis trovi S^{on} Inglada y Ors, aŭtoro de la bonega hispana lernolibro. Malfeliĉe li forestis. Ankaŭ S^o Sabadell, nia fervora samideano, forestis en urbo Palma de Mallorca (Majorko). Mi nur trovis S^{on} Fr. Ribot, kapitano de artilerio, kiu min afablege ricevis. Li bone komprenas nian lingvon sed pro nesufiĉa ekzercado, ne parolas jam flue. Li akceptis esti provize nia reprezentisto en tiu ĉefurbo kie li ne

estos longtempe sola. Lia adreso: 1 Rambla de Cataluña, Barcelona.

En Manreso mi iris alla sidejo de l'*Ateneo obrero Manresano*, entrepreno laŭdeginda por popola lernado, kies animo estas S^o Masvidal y Puig, fervora aprobanto de nia lingvo. Sed tie ĉi ankaŭ neniu parolis esperanton, ni devis interparoli per stranga miksaĵo de lingvoj kastiljana, katalunja, franca kaj esperanta kiu turnigis la kapon de l'aŭdantoj. Ha jes! mi sentis ke tio ne estas la kutima ricevo en Esperlando, kun siaj facilaj, vivoplenaj paroladoj, ĉiam plenaj de nova kaj neestingebla surprizo. Tion ĉi ankaŭ sentis la amikoj Manresanoj kaj ili provis dolĉigi tion per ĉiuj eblaj afablaj kaj precipe per promeso lerni Esperanton tiel ke ili baldaŭ povos paroli. S^{on} Eduardo Segarra, Borne 10, Manresa, prenis sur sin la ŝarĝojn de delegito de Grupo Katalunja en Manresa. Returne en Figueras, ni trovis en tiu urbo aliĝojn skribajn, petojn de informoj ĉiuspecajn elvokitajn de la artikoloj en gazetoj lokaj. Al ĉio respondos speciala sekretariejo trilingva kiun estis bezone tuj krei.

En Franca Katalunjo la afero ne iris pli malbone. Delegitoj estas, en Perpino (Perpignan) S^o P. Baron, instruisto, kaj en Céret (P.-O.) S^o Edouard Agramon, negocisto, fabrikanto de cikloj « Esperanto » kiuj ruladas kun la nomo de nia lingvo sur ĉiuj vojoj de la regiono.

Kiu volas petu regularon (en lingvoj katalunja, espanja aŭ franca) de unu el tiuj delegitoj.

La venonta ĝenerala kunveno de l'*Grupo Esperantista de Katalunjo*, okazos en Barcelona, la Lundo de Paskoj 1905. Fremduloj estas varmege invitataj al tiu kunveneto kies detalojn ni donos poste.

P. B.

K R I T I K O .

Kelkaj Demandoj.

Jen estas ankoraŭ kelkaj lingvaj demandoj kiuj igis min pensadi pri ili kaj kiuj aperis pro malrektecoj trovitaj en lastaj numeroj de esperantaj gazetoj.